

SEMINARIO - OLOMOUC



Antaŭ la X-a tradicia laborkonferenco en Olomouc preparis E-klubo en Olomouc seminarion, kiu komenciĝis la 3-an de januaro 1956, kiam prelegis al ĉeestantoj je temo: „SPERTOJ ĈE TRADUKOJ EN ESPERANTON“, vicprezidanto de EK-Olomouc s-ano Stanislav Římský. Li klarigis, ke ĉiu traduktanto devas alpaŝi al traduktado kun granda pacienco kaj prudenteco. Li rekomendis al ĉiuj tradukadon el nacia lingvo. Preleganto klarigis ankaŭ tutan sintakson de Esperanto la vidpunkto de etimologia deveno de vortoj. Li parolis ankaŭ pri neologismoj kaj per kelkaj partioj el E-gramatiko li montris la karakteron de la aglutina lingvo. Laŭ deziroj de aŭskultantoj la preleginto

promesis pluan prelegon pri pluaj partioj el la gramatiko.

La 4-an de januaro prelegis sekretario de TKKE s-ano Miloš Rudolf je ten „LA UNUA DATREVENO DE REZOLUCIO DE UNESCO PRI ESPERANTO“. En sia prelego li eliris el situacio, kiu ekestis en ĈSR post likvido de EA kaj detalo okupiĝis pri eventoj en jaro 1955, kiuj estis granda alportaĝo por la movado en nia ŝtato. Fine li poste duonindikis, kiamaniere en jaro 1956 eĉ plue divastiĝados laboro de ĉeĥoslovakaj Esperantistoj kaj kiamaniere oni uzados Esperanton por starigo de amikecaj, kulturaj kaj sciencaj kontaktoj kun eksterlando.

La 5-an de januaro prelegis je temo: „INTERNACIA LINGVO DE SOCIALISMO KAJ KOMUNISMO“ prezidanto de E-klubo en Olomouc, s-ano D-ro Vladimír Mohapl. Li klarigis, kiajn erarojn kaŭzis iuj lingvistoj, kiuj, nesciante gvidan ideon de nia Majstro interŝanĝis realaĵojn kaj klopodis senvalorigi ideon de internacia lingvo kaj suspekti pro politika fono. Pro tio okazis multaj eraroj, sed Esperantistoj pruvis, ke ili, per energia laboro pro tuto sekvas nenion alian, ol helpe de internacia lingvo atingi veran amikecon inter nacioj de la tata mondo.

La lasta prelego de la seminario la 6-an de januaro estis dediĉita al demando: „KIEL PROPAGANDI ĈSR-on HELPE DE ESPERANTO?“ S-ano Miloš Rudolf faris resumon de ĉeĥoslovakia literaturo, kiu en esperantlingvaj tradukoj estas je dispono al tutmonda publiko, sed akcentis, ke ne sufiĉas traduki nur beletrion, sed estas necese traduki ankaŭ sciencajn literaturon. Esperantlingvaj enmetaĵoj en turistaj broŝuroj fariĝas neceso kaj nekomprende kompetentaj instancoj estas bedaŭrinda.

- x x x -

La 6-an de januaro venis al Olomouc ŝatataj gastoj el Jugoslavio kiel delegitoj de JEF. Samideano D o b ĉ n i k Matko, redaktoro de „KONTAKTO“ kaj s-anino K o ĉ e v a r Ivanka, ambaŭ el Celje. Kun granda ĝojo ni bonvenigis Vin, karaj jugoslavaj amikoj, kaj kredu al ni, ke ni ĉiuj esperas, ke Vi baldaŭ venos denove kaj ke nian landon vizitos ankaŭ delegitoj el aliaj landoj.

- x x x -

Ekspozicion de E-propagandkestetoj en originaloj preparis por la partoprenintoj de la X-a laborkonferenco en Olomouc en konferencujo s-ano Josef Ž i d .